# Gvidilo pri Reprezentantoj

Ĉi tiu gvidilo klarigas kiel ILEI prizorgu siajn reprezentantojn, kiel ĝi akiru novajn kaj kiel ĝi procedu, kiam reprezentanto ĉesas funkcii. Tiuj tri taskoj estas kutime plenumataj de la sekretario kaj la estrarano (aŭ komisiito) pri Landa Agado kun enplektiĝo de la kasisto pri financaj aspektoj.

Reprezentanto estas membro de la internacia Ligo, loĝanta en lando sen sekcio aliĝinta al ILEI. Foje ekzistas enlanda grupo, foje nur unuopuloj. La tasko de la reprezentanto estas kunligi la kolegojn ene de la lando kun la internacia agado, kaj labori por starigi enlandan grupon kaj/aŭ pretigi tiun grupon por peti aliĝon al ILEI kiel Landa Sekcio.

Eksistas formularo por peti nomigon kiel reprezentanton. Laŭ nia interna regularo, reprezentanto devas esti internacia membro de la Ligo en la jaro de la peto-trakto (punkto 7.3.4.1), kaj tiel resti tra la tuta mandato. Devas esti kelkaj kolegoj en la lando, kiuj estas aŭ povas esti membroj de la enlanda grupo. Plej bonas, ke ili estu ankaŭ membroj de ILEI-Internacia, sed tio ne estas kondiĉo por nomumi reprezentanton. La estraro akceptas kaj reprezentantojn (7.3.4.2), informinte la komitaton pri tio.

Reprezentantoj havas krome la devon raporti pri la agado ĉiujare (7.3.7), inkluzive de raporto pri la instruado sur la tereno (7.3.4.6). Kelkaj landoj kun reprezentantoj estas subtenataj tra la Koleghelpa Kaso, tiukaze ili havas aldonan devon peti realiĝojn ĉiujare. Reprezentanto estas malnomebla kaze de ĉeso de membreco aŭ manko de la jarraporto aŭ alispeca vivsigno. Tion la estraro rajtas fari, sed nur post averto al la koncernato kaj la komitato, minimume tri monatojn antaŭ la okazigo.

Reprezentantoj havas trijaran mandaton, same kiel sekciestroj (7.3.4.4). Praktike, tiu mandato finiĝas en la 31a de marto en jaro, kiam nova estraro estas elektota (sekva okazo: 2012).

## Kiel konservi kaj flegi la reprezentantojn

1. Ĝisdatigi en decembro la raportilon por reprezentantoj, kaj sendi ĝin al ili.
2. Konfirmi kun danko la ricevon de la raporto, kaj la rekotizado.
3. Atentigi reprezentantojn en la 15a de marto, kiuj ne raportis, kaj/aŭ kiuj ne rekotizis por si mem por la nova jaro. Simile atentigi se la subteno de la Koleghelpa Kaso ne estas remendita.
4. Ripeti la atentigon en la 15a de aprilo, ke post tri monatoj, se la mankoj ne estas riparitaj, la koncernato estis transigita al kategorio 'Kontaktpersono' kaj nova reprezentanto estos serĉata.
5. Tra la jaro interesiĝi, ĉu progresas la klopodoj fondi sekcion, kaj ĉu ILEI povas konkrete helpi en tio. Pri tio estas pretigota aparta gvidilo. La petilo por Landaj Sekcioj jam funkcias kiel gvidilo pri la necesa enlanda pretigo. Inter la postuloj estas la arigo de minimume kvin kolegoj, kiuj pretas fariĝi membroj de la internacia ILEI en la jaro de peto-ektrakto.

## Kiel serĉi reprezentantojn en novaj landoj

1. Arigi kontaktojn kun instruistoj aŭ aliaj en landoj sen reprezentanto. Tio povas okazi dum konferencoj, UK-oj aŭ aliaj aranĝoj. Foje LA de UEA povas esti la elirpunkto.
2. Klarigi al la koncernatoj, kiuj estas la rolo kaj devoj de reprezentantoj, sendante la petilon, kiu funcias samtempe kiel gvidilo. Modela letero por ĉi tio ekzistas. En kazo de lando kun (trans)pagaj malfacilaĵoj, klarigu ke, se bezonate, la Koleghelpa Kaso povas solvi la postulatan membriĝon en la internacia ILEI.
3. Rekontaktu la koncernaton, se ne aperas nomigo-peto. Provu liveri kontaktadresojn de potencialaj membroj de formota enlanda grupo.
4. Esploru ĉe aliaj kandidatoj, se la komenca kandidato ne progresigas la aferon.

## Kiel anstataŭigi silentiĝintajn reprezentantojn

Se reprezentanto demisias aŭ fariĝis nur kontaktpersono, necesas serĉi novan reprezentanton. Se ekzistas enlanda grupo, kontaktu tiun kaj petu ĝin nomi novan reprezentanton. Se grupo ne aŭ apenaŭ ekzistas, procedu jene:

1. Arigi liston de potencialaj membroj de enlanda grupo, proponi al ili fondi edukan rondon, ĉu kadre de LA de UEA, ĉu sendepende de ĝi, kaj elekti reprezentanton, kiu ekmembriĝu en la internacia ILEI.
2. Se mankas potencialaj membroj, skribi al LA de UEA, lokaj grupoj, E-centroj aŭ lokaj kluboj en la lando. La Jarlibro de UEA kaj Pasporta Servo de TEJO donas bonajn kontakteblojn. Provu ricevi listojn de retkursuloj el la koncerna lando.
3. Sekvi evoluojn kaj liveri la petilon, por ke nova reprezentanto estu anoncita al la Ligo.

Al ĉi tiu gvidilo aldioniĝas modelaj leteroj, uzeblaj kiel bazo por iuj el la proceduroj skizitaj supre.

SMG: Feb 2011